

TeKu 155 - Februaro 2017

Terminara Kuirejo:



Karaj gekolegoj,

pri TeKu 154 ĝis nun esprimis sian preferon 6 kunlaborantoj:

Guido Brandenburg, Ladislav Haki, Tibor Kristály, Erik Mortensen, Jan Niemann kaj Akiya Yamamoto.

Tibor Kristály atentigis, ke ĉe 04744 kaj 06726 necesas korekto: aranĝo → aranĝaĵo. Al 14796 li sendis korektitan bildon. Pri uzo de reta *UIC*-terminaro ne alvenis demandoj. Ĉu vere ĉio sukcesas? Mi esperas, ke antaŭ la sekva kongreso en *Colmar* pliaj gekolegoj sendos sian kontribuon, precipe se ili ne partoprenos la kongreson.

Heinz Hoffmann

IC-trajno en Koblenz atendas elveturpermeson



Trajnfina signalo ĉe la lasta vagono pruvas la kompletecon de la trajno (vidu terminon 14800)
(bildo: Wikimedia, Christian Libscher)

Kaj ankaŭ ĉifoje denove:

Novaj taskoj – novaj taskoj – novaj taskoj

01682

Veturo de motorvagon(ar)o sen pasaĝeroj kaj bagaĝo.



ĉeĥa
dana
franca
germana
hungara

jízda naprázdno
tomkørsel
marche à vide
Leerfahrt
üres futás

itala
kroata
pola
rumana
slovena
Esperanto
(ĝis nun)

marcia a vuoto
vožnja bez opterećenja
jazda bez ładunku
circulație în stare goală
prazen tek
vakveturo

Terminproponoj:

- 1) vaktrajno motorvagona
- 2) vakveturo de motorvagonaro

Komento

Kvankam ne menciite en la difino, evidente koncernas veturon inter stacioj, do trajnon, ne manovron.

PIV: vaka 1) Libera pro neokupiteco

Pri prefiksa uzo de „vak” komparu kun rimarkigo al „plen”.

04479/05431

Veturo de unu aŭ pluraj lokomotivoj sen vagonaro.




ĉeĥa	<i>jízda jako lokomotivní vlak; jízda samnoté lokomotivy</i>	itala	<i>marcia di locomotiva isolata; percorso di locomotiva isolata</i>
dana	<i>tomkørsel af lokomotiv</i>	kroata	<i>lokomotivski vlak; prazna lokomotivska vožnja</i>
franca	<i>marche haut le pied; parcours haut le pied</i>	pola	<i>jazda luzem; przebieg lokomotywy luzem</i>
germana	<i>Fahrt als Lokzug; Lokleerfahrt</i>	rumana	<i>mers izolat (al locomotivei); locomotivă izolată</i>
hungara	<i>űres futás; gépmenet</i>	slovena	<i>vožnja kot lokomotivski vlak; prazna lokomotivska vožnja</i>
bulgara	<i>празен пробег (локомотив)</i>	Esperanto (ĝis nun)	<i>vakveturo (lokomotivo)</i>

Terminproponoj: 1) lokomotivtrajno
2) vakveturo de lokomotivo

Komento Vidu sub 01682.

03346

Mezuro je kiu nadlorela pintpunkto ĉe tuŝpozicio de la nadlorela tamen disstaras.




ĉeĥa	<i>nedoléhání jazyka</i>	itala	<i>posizione intermedia del deviatoio</i>
dana	<i>manglende tunge-sideskinne-kontakt</i>	kroata	<i>nepriljublivanje jezičaca (pružni odsjek)</i>
franca	<i>entrebâillement (aiguille)</i>	pola	<i>nieprzyleganie iglicy</i>
germana	<i>Klaffen der Zungenspitze (Zungenvorrichtung nicht korrekt verschlossen)</i>	rumana	<i>întredeschidere la acul macazului</i>
hungara	<i>félig nyitott helyzet</i>	slovena	<i>nepriležne kretniška ostrica</i>
bulgara	<i>отворено положение на езика (на жп стрелка)</i>	Esperanto (ĝis nun)	<i>oscedpozicio nadlorela (trakforko)</i>

Terminproponoj: 1) nadlorelpinta mistuŝo
2) nadlorelpinta disstaro

Komento: Koncernas nur kelkmilimetran distancon ĉe pintpunkto de nadlorela, kiu krom tio normale tuŝas fikselon. La trakforko restas surveturebla, la verbo „oscedi” en ĝisnuna termino koncernas laŭ PIV sole nevolan buŝmalfermadon.

12685

Mispozicio de relkomutilo inter la du ekstremaj pozicioj.



ĉeĥa	<i>výměna v mezipolozě</i>	itala	<i>posizione incerta del deviatoio</i>
dana	<i>Sporskifte mellemposition</i>	kroata	<i>medupoložaj skretnice</i>
franca	<i>position d'entrebâillement d'aiguillage</i>	pola	<i>przejściowe położenie zwrotnicy</i>
germana	<i>Weichenzwischenstellung</i>	rumana	<i>poziție de întredeschidere a macazului</i>
hungara	<i>váltó feles állása</i>	Esperanto (ĝis nun)	<i>nadlorela mispozicio</i>

Terminproponoj: 1) relkomutila mispozicio
2) relkomutilo ekster finpozicio

Komento En tiu pozicio trakforko ne estas surveturebla.

08561

Ekstremaĵo de nadlorelo kontraŭe al ties pinto.



ĉeĥa	<i>kořen jazyka výhybky</i>	itala	<i>tallone dell'ago</i>
dana	<i>sporskiftetungerod</i>	kroata	<i>korijen prijedavnice</i>
franca	<i>talon d'aiguille</i>	pola	<i>osada iglicy</i>
germana	<i>Zungenwurzel</i>	rumana	<i>câlcâi de arc de macaz</i>
hungara	<i>csúcssín gyöke</i>	slovena	<i>koren kretniške ostrice</i>
bulgara	<i>пета на език</i>	Esperanto (ĝis nun)	<i>nadlorelkalkano</i>


Terminproponoj: 1) nadlorela fikspunkto
2) nadlorelradiko (en metafora senco)

Komento Tiu ekstremaĵo povas esti komenco de flekseblo (nadlorelo fleksebla) aŭ – malnove – pivotingo (nadlorelo artikita).

PIV: kalkano 2) Posta elstaraĵo de objekto
radiko 2) Tiu parto de organo, per kiu ĝi estas fiksita en alia


10362


Elastecdiferenco de kontaktlino interne de intermasta spano, rilate al mezumo. Malo de (10363).



ĉeĥa	<i>nerovnoměrnost</i>	itala	<i>variabilità (linea aerea)</i>
dana	<i>variation i elasticitet over et mastfelt</i>	kroata	<i>neujednačenost</i>
franca	<i>irrégularité (catenaire)</i>	pola	<i>nierównomierność (elastyczność sieci tańcuchowej)</i>
germana	<i>Ungleichförmigkeit (Fahrleitung)</i>	rumana	<i>neuniformitate (catenară)</i>
hungara	<i>egyenetlenség</i>	slovena	<i>neenakomernost (kontaktni vod)</i>

		Esperanto	<i>vario (kontaktilineo)</i> (ĝis nun)
Terminproponoj:	1) kontaktlinea elaste diferenco 2) kontaktlineo elaste varia		
Komento	PIV: varia	Ŝanĝiganta laŭ la cirkonstancoj	

10363	Malo de (10362).			
	ĉeĥa	<i>rovnoměrnost</i>	itala	<i>uniformità (linea aerea)</i>
	dana	<i>ensartethed</i>	kroata	<i>ujednaĉenost</i>
	franca	<i>régularité (catenaire)</i>	pola	<i>równomierność (elastyczność sieci tańcuchowej)</i>
	germana	<i>Gleichmäßigkeit (Fahrleitung)</i>	rumana	<i>uniformitate (catenară)</i>
	hungara	<i>egyenletesség (felsővezeték)</i>	slovena	<i>enakomernost (kontaktni vod)</i>
			Esperanto	<i>egaleco (kontaktilineo)</i> (ĝis nun)
Terminproponoj:	1) kontaktlinea elaste galeco 2) kontaktlineo elaste konstanta			
Komento	PIV: egala	4) Prezantanta tian similecon kun alia, ke oni ne havas motivon preferi unu al alia		
	konstanta	1) Tia, ke ĝi ne ĉesas esti la sama kaj ne konas ŝanĝiĝon		

14800	Konfirmo, ke en trajno mankas nek pasaĝervagonoj nek varvagonoj.			
	ĉeĥa	<i>celistvost vlaku</i>	germana	<i>Zugintegrität</i>
	franca	<i>intégrité du train</i>	hungara	<i>vonatintegritás</i>
			Esperanto	<i>trajnkompleta konfirmo</i> (ĝis nun)
Terminproponoj:	1) trajnintegrec-konfirmo 2) trajna kompleteckonfirmo			
Komento	PIV: integra	1) Materie tute kompleta, el kiu oni forprenis nenian parton		
	kompleta	1) Tia, ke al ĝi mankas neniu el la eroj, kiuj devas ĝin konsistigi		

Faka Komisiono de IFEF:		Terminara Sekcio:	
Gvidanto:	Jan Uldal Niemann	Sekretario:	D-ro Heinz Hoffmann
Adreso:	Hovedvagtstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør	Adreso:	Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul
Telefono:	+045 71 70 63 83	Telefono:	+049 351 83 85 877
Retadreso:	niemann@kabelmail.dk	Retadreso:	hoffmann-ifef@kabelmail.de